

Año XIV N.º 3 (133)

AGOSTO-SEPTIEMBRE 1962

Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA



Marmora Tabulo kaj bronzaj literoj ornamas la «Esperanto-straton».



Parto el la kongresanaro kuniĝinta ĉe la portalo de la preĝejo.

La 47^a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio

Sub la alta protektado de Moŝta Ĉefministro de Danlando, S-ro Viggo Kampmann, kaj kun Honora Komitato konsistigita de pluraj danaj Ministroj kaj de la Ĉefurbestro de Kopenhago, okazis la 47^a, en la bela ĉefurbo de Danlando, de la 4^a ĝis la 11^a de pasinta aŭgusto.

Partoprenis 1250 kongresanoj, el 36 landoj, el la kvin kontinentoj.

La ĉefa trajto de tiu kongreso estis la provo de la taŭgeco de Esperanto por la sciencoj. Krom la Internacia Somera Universitato, kiu, ĉiujare, sufiĉe prezentas tian taŭgecon, kelkaj elstaraj sciencistoj prelegis pri la Lingva Problemo en la Scienco. Tre interesa estis la prezentado de eventuala reformo de ortografio de Esperanto por la trukmaŝinoj kaj teletipoj.

Oni diskutis la maturecon de la universitataj aferoj por starigi Internacian Universitaton. La decido restis en ŝvebado.

Oni decidis organizi internacian komisionon por reguligi la vulgarnomojn de bestoj. Pri biologia nomenkluturo oni esprimis la deziron forlasi la latinan lingvon pro kreskanta kutima nescio de la lingvo de Virgilio.

Estas notinda la rezolucio de la Scienca Konsilantaro de la Instituto de Geografio de la Akademio de Sciencoj de Sovetunio, pri esperantigo de geografiaj nomoj.

Okazis pluraj aliaj diskutoj, tre altnivelaj, kiuj pruvis, pliafoje, la ekziston de lingvoproblemo, nun solvebla per Esperanto. Pr.^o Neergaard, organizinto kaj Direktoro de la Konferenco, estis, tre juste, gratulita, pro la sukceso de siaj penoj.

Dr.^o Lapenna, krom la bela festparolado, prelegis pri la Lingva Problemo en la Internaciaj rilatoj, kun granda majstreco kaj sukceso.

U. E. A. elektis novan Prezidanton. Dr.^o Hideo Yagi, eminenta ginekologia profesoro en la universitato Okayama kaj Direktoro de la tiea Kancera Instituto, elstara sciencisto kaj fervora longjara esperantisto, okupas, de nun, la Prezidantecon de la Aso-

cio, kaj, pro tio, Esperanto devas fieri; ne nur pro la elstareco de la nova Prezidanto, sed, ĉefe, ĉar tio pruvas, daŭre, la internaciecon kaj tutmondecon de Esperanto kaj de U.E.A. organizo, nun regata de orientano.

Nia madrida samideano Felikso Gómez salutis la kongreson, nome de Hispana Esperanto Federacio.

Oficiale salutis la kongreson, reprezentantoj de jenaj landoj: Aŭstrujo, Belgujo, Finnlando, Okc.^a Germanujo, Italujo, Nederlando, Norvegujo kaj Nov Zelando.

En la Solena Fermo, Sr.^o Lapenna laŭtlegis la Rezolucion de la kongreso, kiun ni publikigos sur la venonta Bulteno. De la venonta februaro, Dr.^o Sadler transprenos la redaktadon de «*Esperanto*» de U. E. A.

Dr.^o Neergaard transdonis la kongresan standardon al la Prezidanto de la LKK de la 48^a, Sr.^o Aleksiev, kaj Sr.^o Holmes la martelon al la nova Prezidanto, Prf.^o Yagi.

Post kantado de «*La Espero*», la kongreso finiĝis...

LA 29^a KONGRESO DE INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

Ĝi okazis en Romo, de la 14^a ĝis la 21^a de aŭgusto, en Rocca di Papa, proksime de la katolika ĉefurbo. Moŝta Sankteca Papo akceptis kaj benis la kongresanojn kaj iliajn E-flagojn. Ĉeestis delegitoj el 20 nacioj, inter ili, hispanoj, sub la prezido de nia kara samideano Dr.^o F. de la Puente, kiu, inter aliaj, prelegis pri la temo: «*Dio estas amo*». Krom ekskursoj kaj vizitoj al religiaj centroj, la kongreso diskutis plurajn punktojn. Esperanto pruvis esti plej taŭga ligilo por samreligiaj el diversaj landoj.

La kongreso akceptis la inviton de la valenciaj katolikaj samideanoj por gastigi la 30^an kongreson en la bela mediteranea urbo, en la jaro 1964. Do, nia lando okazigos, denove, internacian esperanto-kongreson, eble samtempe kun la 25^a kongreso de Hispana Esperanto-Federacio.

LA 35^a SAT-KONGRESO

Ĝi okazis en Vieno, kun partopreno de ĉ. 500 personoj el 18 landoj. 32 infanoj okazigis koncernan kunveneton.

Ĉe la oficiala malfermo, la urbestro de Vieno, Sr^o F. Jonas, malnova esperantisto, alparolis la kongresanojn per korekta Esperanto. La urbodomo akceptis la kongresanaron.

La kongreso estis vere sukcesa. Prelegis Sr^o Laurat, el Parizo, kaj aŭstro, Sr^o Werner. La venonta kongreso okazos en Hamburgo.

XIV.^a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso

Ĝi okazis en Budapeŝto, inter la 15^a kaj la 21^a de pasinta Majo. Ĉiuj hispanaj esperantistoj, kaj, ĉefe, la katalunaj kaj la balearaĵ, rememoras la brilan antaŭan kongreson, en Barcelono, kaj bone povas taksu la forton kaj gravon de la fervojista movado.

Ĉijare, en la hungara ĉefurbo, tiuj ecoj denove elstaris kaj 1.080 aliĝintoj, el 20 landoj, pruvis, pliafoje, la taŭgecon de Esperanto por internaciaj rilatoj.

La kongreso, en si, estis pozitiva, pro la farita laboro, kaj, pri flunkoj aferoj, ĝi estis elstara. La Ministro pri Trafiko kaj Poŝto, estis la Protektanto de la kongreso. La kongresanoj guis belajn ekskursojn, tiel al grotoj kiel al la bela Balaton-lago. Plie, ili vizitis fabrikojn, tipajn urbojn kaj vilaĝojn, kaj tremis en la moderna hungara vivo.

Multaj artaj manifestacioj estis prezentitaj, tiel en la famaj grotoj en Aggtelek kiel en la Kongresejo kaj Operejo; multe brilis la Internacia Balo.

La Ferma Kunsido okazis apud la Balaton-lago, kun granda sukceso.

Ni povas antaŭdiri, ke, se ĉiuj profesiaj fakoj havus tiel fortan movadon kiel la fervojista, la venko de nia idealo estus tute baldaŭa. Pliafoje ni povus diri ke, nia afero, rilate ili, iras... kvazaŭ surrele..!

PREMIO COMELLA - BASSOLS

KVARA KONKURSO

VERDIKTO

La Juĝanta Komisiono hava: la honoron deklari ke, pro favora ĝenerala voĉdonado, la plej alta nombro da poentoj estas atingita de la konkursaĵo PAŬLO LA FETORA kies aŭtoro estas samideano Salvador Gumá el kataluna urbo Reus (Hispanio).

La kreinto de la Premio, Sr^o Jacint Comella kaj la Juĝantaro gratulas kore la gajninton kaj dankas multe la partoprenintojn pro ilia arta, samideana kunlaboro.

Barcelona - Hispanio, 1962. Teo Jung, Emilja Lapenna, L. Mimó kaj Francesc Vilá - Sekretario.

Hispana Esperanto-Federacio tuktore gratulas la gajninton, kiu, pliafoje, pruvas sian talenton kaj kapablon. Samtempe, ĝi estas okazo por sendi nian koran saluton al la mecenato, nian veteranan amikon Jacinto Comella, al kiu ni deziras multajn premiaĵojn!

El Esperanto es un idioma que presenta una característica especial: no necesita interlocutor. Toda esa hermosa difusión actual del idioma internacional, que permite encontrar con quien hablar en cualquier parte del globo, es un regalo que capta, cada vez más, a los que saben apreciar las ventajas de un lenguaje internacional.

Pero los esperantistas que han asimilado la maravillosa estructura del idioma de Zamenhof ya no necesitan interlocutores para encontrar el placer de ser esperantistas.

En verdad, los que más beneficio encuentran en el idioma internacional son los que, aislados en un villorrio montañoso o en un escondido valle, han hallado, por medio del idioma mundial, la manera de ampliar hasta límites mundiales, su horizonte de relación.

Por eso, resulta afortunada y nada hiperbólica la frase:

“El Esperanto: una ventana abierta hacia el Mundo”.



Post efektiviĝo de nia lasta kongreso ni povas aserti ke ĝi estis vera, pozitiva sukceso. Kaj, la plej agrabla aspekto de nia aserto estas tia pozitiveco, kiun ni konstante celas, sed, ne ĉiam atingas. Multaj kongresoj sukcesas, ili brilas kaj, eĉ, ili estas ekonomie fruktodonaj por nia organizo, sed, post kelkaj jaroj, oni penas por trovi, en tiuj estintaj kongresurboj, la frukton de la semoj, tiel pene kaj ofere disjetitaj. Post konscia ekzamenado de la kongresaj aferoj ni povas, fiere, aserti ke Valladolid estas kaj estos bona grundo por la disvolviĝo de nia prilingva doktrino; ni trovis, tie, vigan, entuziasman kaj kapablan junularon, kiu esperigas nin al brila estonto. Ĉifoje, niaj penoj estos bone pagataj!


ANTAŬKONGRESAJ TIMOJ. — Tiel la Organiza Komitato kiel la Estraro de la Federacio multe timis, dum la lastaj monatoj, pri la sukceso de la entrepreno. La malmultenombreco de la aliĝoj, la indiferecenteco pri la turisma graveco de la regiono, la tradicia trovarmeco de Kastilio kaj, ne laste, la koniteco de la regiono, pro antaŭaj prikongresaj trajtoj, formis malfavoran etoson, kiu endanĝerigis la sukceson de la XXIII^a.

Sed, la disciplino kaj obeemo de la esperantistaro, kiu atentis nian alvokon, plenigis, lasthore, la aliĝliston, kaj la kongresanoj plenigis siajn okulojn per miloj da belaj panoramaj kaj artaj bildoj, kiuj incitis ilin al posta reveno, kaj, aldone, ili vivis en tre milda temperaturo, dumtage, kaj, eĉ, ili sentis pozivivan malvarmon dumnokte.

La fizika ĉeesto de la Aŭtoritatuloj kaj ilia favora sinteno, rilate la tuta organizado de la kongreso, estis decidiga. Tiel malferma kiel ferma kunsidoj, kaj inaŭguro de la «Esperanto-strato», estis okazoj en kiuj tiu inklino estis pruvitaj. Neniu ĉeestinto forgesos ilin!

Ni recenzos, mallonge, la kongresajn okazintaĵojn. Ili, vere, meritas kvaroblan amplekson, sed ni akceptas la limigon de tiu numero de nia Bulteno, ĉar tiuj, kiuj kongresis, aldonos sian privatan impreson, kaj, tiam, la recenzo trovos sian ĝustan esprimon!

LA AKCEPTO.—Kiel decidite, la 24^an de Julio vidis la alvenon de la plejparto de kongresantoj. La Domo de la Studento estis adekvata akceptejo, kie deĵoris la tuta



Ĉe multaj publikaj lokoj, tiuj artaj pankartoj avertis pri la Kongreso.

O-K-K, preta por solvi ĉiujn malfacilaĵojn, kaj la daŭra alveno de foranoj kaj eksterlandanoj tuj vigligis ĉiujn salonojn. Kiam, malfrue, alvenis la valencia karavano, ĉio estis plenŝtopita kaj regis tiu simpatia etoso de nia granda rondo familia. Post vespermanĝo, ĉiuj renkontiĝis, denove, kaj, tiam, okazis neatendita vizito de la «Tuna», studenta gitarludantaro, kiu, dum pli ol unu horo, gajigis la kunvenon per tradiciaj studentaj kantaĵoj, kiujn tre ŝatis la aŭdantaro. Kiam, forirante, la ludintoj eliris al la korsio, la vivaĵoj akompanis la belajn notojn de gitaroj kaj mandolinoj. Multaj «tunistoj» interesiĝis pri Esperanto kaj promesis lerni ĝin!

LA SOLENA MALFERMO.—Matene, la granda salono «Aŭla Magna» de la Universitato, kiu, dank'al la ĝentilo de la Moŝta Rektoro, fariĝis kongresejo, estis okupita de multenombra ĉeestantaro, kiu aplaŭdis, laŭte kaj daŭre, la aperon de la Aŭtoritatuloro, sub la prezido de M.^a S.^o Rektoro, D-ro Hipólito Durán.

La vigla Sekretario de la O-K-K, S.^o Cantalapiedra, klarigis al la prezidantoj la ĵusan historion de la kongreso kaj de la loka Esperanto-rondo. Li, emocie, dankis al la Aŭtoritatuloj, pro la simpatia helpo al la kongreso, kaj, al la kongresantoj, pro la ĉeesto kaj vigligo de la kunveno.

Poste, S.^o advokato Basílides Sanz, Prezidanto de la OKK, reliefigis la gravecon de la kongreso, kiu pravas la maturecon de Esperanto en Hispanujo, kaj ŝian kontribuon al la vera vojo por la Paco.

Poste, Sam.^o William Vathis, el Usono, salutis la kongreson kaj rakontis kiel, dank'al Esperanto, li povis interkompreniĝi, en la tuta mondo. Dum lia restado en Hispanujo li ĝuas la kamaradecon de hispanoj kaj, tial, li partoprenas la kongreson tre plzure.

S.^o Pelletier, franca samideano, tiel konata de ĉiuj pro lia ĉeesto en preskaŭ ĉiuj kongresoj en nia lando, salutis la ĉiĵaran, kaj sciigis ke li entreprenos, baldaŭ, tuteŭropan propagandan rondiron,

ĉar, laŭ lia diro, li sufiĉe laboris por vivi teni. De nun, li laboros por Esperanto.

Ambaŭ estis tre aplaŭditaj.

D.^o Herrero, Prezidanto de H. E. F., rememorigis pri la lasta kongreso en Palma, kiu, pro la vera internacia partoprenintaro, pruvis, sendiskute, la taŭgecon de la internacia lingvo por ĉiuj aspektoj de la vivo. «Valladolid—diris D.^o Herrero—estas grava urbo, kie okazas internaciaj kongresoj, kun gravula partoprenantaro. La nia, kontraŭe, estas kongreso de diversklasaj personoj: kelkaj intelektuloj, pastroj kaj instruistoj, multaj oficistoj, dungitoj kaj, eĉ, manlaboristoj. Tamen, nia kongreso povas fieri pri instruo al ĉiuj aliaj, ĉar ni akiris la rimedon por forigi la internacian surdmuditecon kiu hontigas la intelektulajn kongresojn». «Antaŭ kelkaj jaroj, okazis en Valladolid internacia kongreso sub la alta protekto de Moŝta Ĉefepiskopo, kaj ĉeestita de altaj postenuloj, eĉ Ministroj. En tiu kongreso, kiel en ĉiuj aliaj, la penoj kaj bonvoloj de ĉiuj perdiĝis pro la malkompreno inter diversnacianoj. Nur tri kongresanoj trovis la tutan profiton de la kunveno: germano, franco kaj hispano. Ili estis esperantistoj, kaj por ili ne ekzistis baroj».

«Ni venas ĉi tie por ripeti tiun lecionon, kiun ni deziras estu lernata de ĉiuj. Ni esperas ke ĉiuj trovu, kiel ni, la ĝustan kaj solan vojon kiu kondukos la Homaron al la estimon, la amon kaj la Pacon!».

Ĉiuj oratoroj estis varme aplaŭditaj, kaj, eĉ la fino, Moŝta Rektoro deklaris la Malfermon de la Kongreso. Tuj poste, la ĉeestantaro kantis la unuan strofon de nia himno.

La Kongreso bone komenciĝis!

LA SOLENA MESO.—Ĝi okazis en la historia kaj artvalora preĝejo Santa María la Antigua. Surprize, ni havis du predikojn en Esperanto. Juna pastro, Jonás Castro, el Santovenia, apud Valladolid, mirigis nin per bela prediko, bonege teksita per bonega Esperanto, dum pastro Francisko Fernández Serrano, religia konsilanto de K. E. H. A., komencis la celebradon de la meso.



Ĉeestantoj en la malferma kunsido, en la «Aŭla Magna».

Kiam li finis, supreniris la podion nia kaplano, patro Jozefo Casanovas, nia maljuna sed ĉiam vigla kaj estiminda gvidanto. Li disvolvis la temon de la prediko kun la kutima kaj atentinda majstreco, kiun bone konas ĉiuj hispanaj samideanoj.

Belaj samideaninoj el Valladolid, Zaragoza kaj Valencia ĉeestis la meson, tipe vestitaj kaj ornamitaj per «mantilla» kaj «peina», kaj portis la koncernajn standardojn.

Ĉe la foriro, sur la preĝeja perono, la tuta samideanaro estis fotita, por fiksi por la estonto la bildojn de ĉiuj partoprenintoj.

PREPARA LABORKUNSIDO.—Kiel kutime, la kongresa laboro estas preparita en tiu kunsido, por posta prezentado al la ĝenerala kunveno. Multaj delegitoj ĉeestis, vigle diskutis kaj proponis, kaj kontentige pruvis sian kapablon kaj agemon.

D-ro Herrero malfermis la kunsidon kaj indikis ke, antaŭ ĉio, oni devis elekti la gvidantaron de la laborkunsidoj. Laŭ lia propono oni elektis unuanime sam.^on Ba-

silides Sanz, kiel Prezidanton, kaj sam.^on Mariano Cantalapiedra, kiel Sekretarion. Ili tuj supreniris la podion kaj gvidis la diskutadon.

D-ro Herrero prezentis al la kunsido la unuan aferon; pro regulara postulo li ne plu povas okupi tiun postenon; ankaŭ ne la Sekretario, la unua Voĉdonanto nek la Kasisto. Ĉar en Valencio, ĝisnuna federaciurbo, pruvigis ke la personoj kiuj, inde, kapablus surprizi tiujn postenojn, ne povas akcepti ilin, pro diversaj kialoj, la Federacio devas iri en alian urbon. Post rifuzo de madridanoj kaj barcelonanoj, D-ro Herrero opinias ke Zaragoza povus esti tre taŭga federacia urbo, ĉar en ĝi loĝas multenombra kaj bone organizita samideanaro, kaj, ĉefe, prestiĝa kaj valora samideano, Moŝta Honora Rektoro de la ticia Universitato, Prof. Miguel Sancho Izquierdo, kies gvidado povas esti ege profitodona por H. E. F. Tiun proponon akceptis plaĉege ĉiuj ĉeestantoj, kiuj aplaŭdis varme la proponiton.

Prof. Sancho Izquierdo, per emociigaj frazoj akceptis la mendon, spite de siaj



Ĵus finita la malferma kunsido, la aŭtoritatoj estaras por auskulti Nacian himnon kaj «La Espero-n».

multaj okupoj kaj postenoj, kondiĉe ke li havu, kiel sekretario fr.^{na} Inés Gastón, kies kapablo kaj entuziasmo estas garantio por la kontentiga irado de la federaciaj aferoj; ĉiuj akceptis tian decidon kaj esperis ke ŝi akceptu ankaŭ.

S-ro Cantalapiedra legis proponon de sam-o Antonio Rico, el Ceuta, por ke tiu urbo estu akceptata por la venonta kongreso. D-ro Herrero analizas la kondiĉojn de la proponita urbo. Avantaĝoj: la mempropono, la allogo de la afrika medio, la bela andaluza trairado, kaj, ĉefe, la okazo por semi nian doktrinon en lokon kiu multe bezonas ĝin. Malavantaĝoj: forta elspezo kaj longa tempuzo. S-ro Rico devas esti konsultata pri diversaj punktoj: loĝejo, k. t. p.

Kelkaj samideanoj esprimas sian malfavoran opinionon, pro la longa distanco kaj fortaj vojaĝelspezoj. Eĉ ili promesis sian malĉeston.

Sam-o F. Vilá, el Barcelono, proponis Reus; sam-o Gumá, el Reus, opinias ke ĝi

ne povas gastigi la kongreson pro manko de organizantoj; li, almenaŭ, ne povas surpreni tian ŝarĝon, pro tempomanko.

Sam.^o Dario Rodríguez, el Madrido, proponis Andorra-n. Sam.^o Herrero respondis ke Andorra ne estas Hispanujo; ĝi povas esti ekskursocelo por ne malproksima hispana kongresurbo, se tiu ekzistus kaj estus sufiĉa organizantaro.

Pro manko de decido oni komisiis la Estraron por ke ĝi elektu la plej taŭgan urbon por la venonta kongreso.

Sam.^o Herrero klarigas al la samideanaro la kialojn de la misfunkciado de Libroservo. Li legis leteron de D-ro Tudela, kiu ĵus transprenis la taskon ordigi tiun fakon, kaj ĉiuj komprenis ke, de nun, la afero iros bonan vojon.

Pro okulmalsano, la kasisto, sam.^o Guillellem, ne povis kongresi. Dr.^o Herrero laŭdis tiun modelan samideanon, kiu, senlace, laboras tre kontentige. Laŭ lia raporto, la Federacio uzis la superaviton por



Belaj fraŭlinoj, tipe vestitaj, kun la esperanto-flagoj, ĉe la preĝejo.

plenumi la decidon de la kongreso en Castellón, eldonante propagandan Bultenon, kies kosto estas preskaŭ la duoblo de la fiksita prezo: 1 pto. Ĉiuj laŭdis tiun decidon kaj tuj komenciĝis kreskantaj petoj por la diversaj grupoj.

Dr.^o Herrero dankis ĉiujn pro la videbla bonvolo, kaj asertis, ke, pro tio, la eldono estos baldaŭ elĉerpita.

Pri la bedaŭrinda disputo pro la nuntempaj gramatikaj opinioj, oni decidis ke nek Federacio nek Bulteno kuragiĝos ĝin, kaj restos apartigita de ĉio kio povos disigi nin.

Estis legita letero de sam-o Moral, el Gandía, pri la enkonduko de Esperanto en la Akademio CCC, laŭ decido de la lasta kunsido de tiu organizo en Zaragozo. La letero klarigas la gravecon de tiu decido, pro la granda disvastigo de tiu organizo en Hispanujo kaj diversaj landoj. Oni decidis gratuli sam.^on Moral, kies insisto kaj penado okazigis tiun decidon.

Kiel kutime en ĉiuj kongresoj, oni aprobis la sendadon de telegramo al la Ŝtatestro kaj al la ĵus nomitaj Ministroj por Edukado, kaj Informado kaj Turismo, pro la ĵusa alnomigo.

Sam.^o Bosch, el Valencia, insistas pri la instruado de E. en Porinstruistaj Lernejoj kaj Seminarioj, kaj li informis pri la sukceso de la mallonga kurso farita en la Lernejo por instruistinoj, en Valencia.

Sam.^o Diez sciigas ke li revenis el Ameriko kaj pri la enkonduko de E. en Universitato en Kolombio kaj en la Dominikana Respubliko. Tio devas kuragiĝi por sama afero en Hispanujo.

La Sekretario legas leteron de sam.^o Gisbert, el Barcelono, en kiu li sugestas ke oni petu stipendion al la «Fundación March».

Sam.^o kiu subskribas «D» sugestas la akiron de bieno por la junularo, kiu estus taŭga kunvenejo kaj libertempejo, laŭ funkciado de la franca kastelo Grésillon.

Sam.^o Gumá, el Reus, proponas ke oni eldonu turisman broŝuron en nia lingvo.

Sam.^o Z. Caminero, el Valladolid, legas proponon por ke oni petu, al la militistaj Instancoj, ke scipovo de E. estu agnoskita kiel meriton, laŭ oficiala decido de hispana Registraro antaŭ multaj jaroj.

Fine de la kunveno, la Prezidanto sugestas ke ĉiuj devas koni ĉiujn. Aprobite, ĉiuj ĉeestantoj, unu post la alian sin levis kaj laŭtis sian nomon kaj urbon. Tiel, la reciproka interkono estis faciligita, kun konstatabla kontento.

Do, la kunsido estis vere labora kaj ĉiuj interesaj aferoj estis preparitaj por prezentado el la ĝenerala kunsido.

JUNULARA KUNVENO.—Dum okazo de la prepara laborkunsido, kunvenis, en aparta salono, la Junulara Sekcio.

Pro la graveco de la debato kaj de la decidoj, ni publikos ĝin en la venonta numero de nia Bulteno.

Tuj post la finiĝo de la prepara laborkunsido, la tuta kongresanaro ekeniris la salanon por aŭdi la belan

PRELEGON DE PROF. DELFÍ DALMAŬ.—Ni, tiuj, kiuj, aliajn fojojn, ĝuis aŭdante la belajn paroladojn de sam.^o Dalmaŭ, konstatis ke li pli kaj pli majstras lingvon kaj oratorecon. Tiuj, kiuj, ĝis nun, ne estis ankoraŭ aŭdinte lin, spertis kiel bela estas Esperanto kiam ĝi estas uzata de talenta oratoro.

«Interlingvo, estinte kaj estonte» estis la interesplena temo kiun li disvolvis antaŭ la kongresanaro.

«La primitivaj popoloj uzis tre malmultajn vortojn, ĉefe, gestojn, grimacojn, sola natura lingvo en nia mondo. Greka lingvo fariĝis, poste, la unua interlingvo, en kiu la Biblio estis tradukita.

Sekvis la latina, kies rolo ankoraŭ daŭras. La araba, ankaŭ, kiam Kordovo estis kultura ĉefurbo, taŭgis por instrui la uzon de la ciferoj por la nombrado. Kvara komuna lingvo estis la kastila, kiam Valladolid estis ĉefurbo de Hispanujo. La franca,

poste, fariĝis ĉefa kulturlingvo, kies regado atingis la nunan jarcenton. Sed, meze de la pasinta, paralele al la homaj rajtoj, vekigis la lingvaj rajtoj de popolaj parolmanieroj, ĝis tiam sen literaturaĵoj, aŭ kun stagnanta produktado; tiel: la pola, ĉeka, flandra kaj kataluna. Zamenhof antaŭvidis la neceson de neŭtrala internacia lingvo por ebligi lingvan justecon inter la popoloj kaj eviti malpacon.

Nun, okazis rekono de la lingvaj rajtoj kaj pligravigis la neceso de Esperanto. Voĉoj tiel prestiĝaj kiel tiuj de Menéndez Pidal kaj Pemán esprimis simpatian al Esperanto; la lasta, eĉ, diris, ke nia lingvo estas popola genia solvo de internacia lingvo. Sed *l'homme stupide*, laŭ esprimo de Charles Richet, bezonigas longan, fortan bataladon, por venki antaŭjuĝojn kaj rutinon.

Ni devas ĉiam memori ke ni devas konstante frapadi, laŭ observo de Zamenhof, ĉar: «unu semo perdiĝas, mil semoj perdiĝas, sed, eĉ guto malgranda, konstante frapanta, traboras la rokon granitan».

Post la bela oratoraĵo, Prof. Régulo Pérez, per simpla sed plensignifa frazo, esprimis la ĝustan valoron de la ĵusa parolado de sam-o Dalmaŭ.

Vespere, pro neeblo por efektivigi la anoncitan folkloran prezentadon, la kongresanaro estis regalata de ĝojiga komedio: «¿Quién me compra un llo?». Ĉiuj ĝuis la komikaĵojn kaj ridegadis plenplezure.

Kaj tiel finiĝis la unua kongrestago.

XXVI-VII.—Kiel anoncite, la kongresanaro, peraŭtobuse, vizitis ĉiujn departementojn de la aŭtomobilfabriko «Fasa», modernega instalado; de la ladopeco ĝis la brila, dezirinda «Ondine», ĉio estis vizitita, dum du horojn, kaj, poste, ĉiuj rapidis por ĉeesti la

INAŬGURON DE LA «ESPERANTO-STRATO».—Moŝta Urbestro, S-ro Santiago López González, persone regis la ceremo-


nion, per kiu, ĵus planita strato, en bela, moderna kvartalo, nomigus per la nomo de nia lingvo. Post legado de la decido de la urbestro, fare de skabeno, la Urbestro alparolis la ĉeestantaron per belaj vortoj, kiuj reliefigis la emon de Valladolid al ĉiuj kulturaj kaj moralaj entreprenoj. Tial, la alnomigo de strato per la nomo de Esperanto, estas plia pruvo de tiu inklino. Li estis aplaŭdita, kaj, sekve, la Prezidanto de la Federacio esprimis, per mallonga paroladeto, la dankon de la hispanaj esperantistoj, kiuj povas aldoni, en la liston de esperantaj stratoj, plian numeron, kiu gravigas la rangon de nia lando. Estas signifa fakto ke la nova strato iras paralele al vojo, kies nomo estas «La Espero». Estas fakto ke Esperanto strebas kaj esperas pri pli bona kaj paca vivado, en la estonto. La decido de la valladolida urbestro estas, do, plene gratulinda kaj esperiga por paralela agado por kulturo kaj paco.

La ceremonio estis emociiga, ĉefe dum la momento kiam la Urbestro malkovris la belan tabulon kun la surskribo «Calle del Esperanto».

Kun gaja koro kaj videbla optimismo, ĉiuj enaŭtobusigis kaj iris sur la grandan placon, kie situas la historia urbodomo de Valladolid.

AKCEPTO ĈE LA URBODOMO.—

Post kuniĝo antaŭ la fasado, la kongresnaro supreniris la belan peronon kaj ĉe la supro, la tuta valladolida aŭtoritatularo akceptis ilin, kaj ĉiuj eniris la belan, imponan festsalonon. Tie, ankoraŭfoje, la Urbestro salutis ĉiujn kaj reliefigis la emon de la urbo al ĉiuj esprimoj de kulturagado, inter kiuj Esperanto elstaras, pro ĝia moralaj kaj pacama signifo. Dr.^o Herrero, respondante, klarigis la socian celon de Esperanto, kiu provizas, al la homaro, rimedon por efektiviĝi ĉion bonan kaj utilan inter la popoloj. Li asertis ke, jam, la koroj de la kongresanoj, pro la afableco kaj ĝentilaĵoj de la valladolidanoj, restos tie por ĉiam, kiel garantio de eterna dankemo.



Akcepto en la festsalono en la Urbestrejo.

Abunda kaj bonkvalita lunĉo atendis la kongresanojn, kaj, dum longa horo, ĉiuj manĝis, trinkis kaj ĝuadis, en la bela festsalono, kiu, unuafoje, gastigis la heroldojn de la lingvo de la paco.

Flanke de la kongresa agado de H. E. F., la katolikaj esperantistoj kunvenis, en la kolegio «La Salle», kiu gastigis la oficialan kunvenon de la

KATOLIKA ESPERANTA HISPANA ASOCIO.—Sub la prezidanteco de D-ro Fernando de la Puente, sidis, sur la podio, R. P. kanoniko Francisko Fernández Serrano, konsilanto de la Asocio, sam.^o Molera, el Moyá, kaj Dr.^o Herrero, Prezidanto de H. E. F.

Kanoniko R. P. Francisko Fernández alparolis la multenombrian ĉeestantaron kaj klarigis la disvolvigon de la agado de la Asocio.



La Prezidanto de la Federacio dum sia parolado en la malferma kunsido.

D-ro De la Puente temis pri la eldonado de meslibro en Esperanto kaj pri la ampleksigo kaj perfektigo de la revueto «Katalogo Esperantista».

D-ro Herrero konfirmis sian proponon pri okazigo, en Valencio, en la jaro 1964, de la kongreso de I. K. U. E. D-ro De la Puente promesis transdoni tiun proponon dum la venonta kongreso en Romo.

Intervenis, tre trafe, sam-o R. Molera, pri aferoj rilatantaj la internan reĝimon de K. E. H. A.

La kunveno estis tre labora kaj profitas; ĉiuj promesis kunlabori por la plej brila sukceso de la venonta kongreso de I. K. U. E. en Valencio.

PRELEGO DE PROF.^o REKTORO MIGUEL SANCHO IZQUIERDO.—En la granda salono de la Universitato, sub la prezidanteco de valladolida gravularo, kaj kun ĉeesto de la tuta kongresanaro kaj multaj interesitoj, okazis la memorinda prelego de la venonta Prezidanto de H.E.F.

D-ro Herrero prezentis la oratoron, akcentante ke, en universitata kadro, universitata elstarado prezentos faktojn kiuj interesas al universitataj fakoj. Post tiuj vortoj, Prof. Sancho Izquierdo

leviĝis kaj estis akceptita per longa aplaŭdado. Li disvolvis majstre, didakte kaj konvinke, la temon, kaj, ĉar la prelego estis hispanlingva, ni transkribas ĝin, resume, en la saman lingvon.

EL ESPERANTO, MENSAJERO Y MENSAJE

Comienza el orador exponiendo las tres posiciones que se han venido adoptando frente al Esperanto: la de burla, la de recelo y, finalmente, la de comprensión. En orden a ésta, muestra como el Esperanto, lengua auxiliar internacional, en primer término, transcende luego de él para mostrarse lengua literaria y además portadora de un mensaje que le hace ser—de ahí el título de la Conferencia—«mensajero» y «mensaje», es decir, instrumento apto para llevar a través del mundo cualquier mensaje y, a la vez, mensaje especial de amor y fraternidad entre los hombres.

Como lengua auxiliar internacional, el ser el Esperanto lengua viva, neutral, fácil de aprender e igual en pronunciación por todos, le ha asegurado un logro que ningún otro intento en este sentido consiguió. Como lengua literaria, presenta el orador algunos ejemplos de poesías originales y traducidas, subrayando la flexibilidad del Esperanto y su riqueza de voces que le permiten matizar la expresión en forma insuperable. Finalmente, como idea, mue tra que ello estuvo presente en la mente de Zamenhof desde un principio, ya que esa idea es la que le movió a crear este idioma, habiendo manifestado muchas veces la desilusión que hubiera sido para él comprobar que su creación quedaba reducida a un mero instrumento para la correspondencia entre comerciantes, filatélicos, etc. Esta idea, subraya el orador, cómo no debe inspirar recelo, máxime a los cristianos, pues si bien esa fraternidad que el Esperanto entraña es de un orden puramente natural, ello no implica que no pueda trascender de él como de hecho transcende y se sobrenaturaliza en el esperantista católico.

Hoy—termina diciendo—es sólo el miedo a la guerra el que impide que la guerra esta-

lle; pero el miedo a la guerra está muy lejos de la verdadera paz y no puede dar lugar a ella. La paz («tranquilidad en el orden» según la definición agustiniana) sólo puede basarse en el amor entre los hombres, reflejo y aspecto para los cristianos del amor a Dios. Por ello, se ha pedido para la U. E. A., como entidad la más representativa del Esperanto, por diversos organismos y entre ellos, por la Universidad de Zaragoza, el Premio Nobel de la Paz.

Ni nur aldonas ke la prelego estis multfoje tranĉata de entuziasmaj aplaŭdaĵoj kaj ke ĉiuj, ĉe la fino, fieris pri la fakto ke tiel elstara kaj klera universitatano akceptis la venontan prezidantecon de la Federacio.

Advokato Basilides Sanz, Prezidanto de la O. K. K., per bela kaj trafa alparolo, resumis la prelegon, dankis la oratoron kaj interpretis la ĝeneralan senton, tiel de esperantistoj kiel de cetera aŭdantaro.

En la teatro de la kolegio de La Salle, okazis la anoncita koncerto de la «Coral Vallisoletana», lertege gvidata de majstro Barrasa; ĝi interpretis, ĝuste kaj sentige, belajn partiturojn, tiel kastiliaj kiel el la ceteraj hispanaj regionoj, vekante, ĉe la multnombra aŭdantaro, admiron, plezuron, sentojn, kaj, fine, dankesprimojn.

27-VII-52.—Matene, ĉiuj kolektiĝis, sur apuda placo de la Universitato, por efektiviĝi, sub la lerta gvidado de belaj kaj afablaj valladolidaj samideaninoj—kiuj, tre detale, klarigis ĉiujn elstarajojn—la

VIZITOJN AL LA MONUMENTOJ.—Kvankam Valladolid ne estas muzeurbo, kiel Segovia, Avila kaj Toledo, ĝi enhavas abundon da artaj riĉaĵoj, tiel arkitektaĵoj kiel skulptaĵoj kaj pentraĵoj. Ĝi estis ĉefurbo de Hispanujo ĉe la komencigo de la imperia periodo, kaj tio lasis profundan impreson sur monumentoj, konstruaĵoj kaj ceteraj urbaj aspektoj.

Unue vizitita estis la Kolegio Sankta

Kruco, kies fasadon konas la legantoj de Bulteno: ĝi enhavas gravan bibliotekon kaj la provincan arĥeologian muzeon; la klostrita korto estas elvokiga.

Oni preterpasis, poste, la preĝejon Sankta Maria la Antigua, konata de la kongresanoj, kaj la domon kie loĝis Cervantes, kies plumo glorigis la kastilan lingvon.

La Nacia Muzeo pri Skulptarto, en la malnova monaĥejo Sankta Gregoro, estis detale vizitita, sub la alta gvidado kaj klarigado de sia Direktoro S-ro F. Wattemberg, kiu, majstre, malkovris al la vizitantoj la signifon kaj detalojn de la trezoroj, iam skulptitaj de tiuj inspiritaj artistoj kiuj nomiĝis: Gregoro Fernández, Johano de Juni, Alonso de Berruguete, Diego de Siloé kaj Pompejo Leoni. Vizitinte ĉion ni komprenis ke, nur pro tio, la vizito al Valladolid valoris la penon! Ĉiuj admiris la belan, prilaboritan fasadon kaj la nekompareblan klostron, kies bildojn bone konas la legantoj de nia Bulteno.

La monaĥejo Sankta Paŭlo, kies fasadon ankaŭ konas niaj legantoj, estis vizitita, kaj, poste, la Deputitejo, kies enirkorto, prezentas, surkaŝe, la tutan historion de la urbo.

La arta rondiro finiĝis ĉe la placo de la Urbodomo, kie multaj, antaŭ duonglaciigita biero, komentariis, plenplezure la senfinajn belaĵojn ĵus viditajn.

EKZAMENOJ.—Kiel anoncite, efektiviĝis ekzamenoj por la elementa grado. Ĉiuj ekzamenitoj pruvis sian kontentigan sciencan, kaj, eĉ, multajn, sian elstarecon. Profesoro Régulo Pérez kaj sam^o R. Molera estis la ekzamenantoj, kaj ili aprobis tiujn samideanojn:

S-ro José de la Palma Andrés, Valladolid.

» Basilides Sanz García, Valladolid.

» Zoilo Caminero Porro, Valladolid.

» Gonzalo Castañón Pérez, Valladolid.

» Rafael Sánchez Navarro, Valladolid.

P.P. Jonás Castro Toledo, Santovenia de Pisuerga.

En.^o Clementina Tranque Iglesias, Valladolid.

S-ro Francisco Pérez Andrés, Valladolid.

- » José Sastre Lago, Valladolid.
- » Esteban González Prieto, Santander.
- » José Pinedo Rodríguez, Santander.
- » Luis Martín Herrero, Palencia.
- » Tomás Ortiz García, Alar del Rey.
- » Jesús Liaño Pacheco, Salamanca.
- » Nicanor Moreno Fermoso, Valladolid.
- » Nilo del Olmo Fuente, Valladolid.

En.^o Gertrudis Méndez Rodríguez, Valladolid.

De nun, do, tiuj samideanoj povos fieri pri la koncerna diplomo kiu atestos pri ilia kapablo por regi bone Esperanton.

II^a LABORKUNSIDO. — En la sama aŭlo kie okazis la preparakunsido, kunvenis la tuta kongresanaro por plia diskutado de la temoj preparitaj dum la unua, kaj por la definitiva aprobo de la rezolucioj.

Prezidis S-ro Basilides Sanz, kaj helpis S-ro Cantalapiedra.

Antaŭ ol pritrakti temojn, la Sekretario laŭtlegis diversajn salutojn de esperantaj asocioj kaj grupoj, tiel hispanaj kiel eksterlandaj; inter ili, tiujn de Meksika Esperanto-Asocio, fare de nia elstara sm.^o Francisco Azorín, kaj de D-ro Adolf Halbeld, el Knittelfeld, nome de la stiria sekcio de Aŭstria Esperanto-Federacio. Ili estis tre varme akceptitaj.

Inter la privataj salutoj, estis tre aplaŭdita tiu de D-ro Mariano Solá, nia kara kaj altŝatata samideano, bedaŭrinde mankanta en nia kongreso, pro profesiaj devoj.

Mirindaĵo! Inter la privataj salutoj, enŝoviĝis, ni ne scias kiel, speciala saluto de D-ro Zamenhof, mem, por la XXIII^a Kongreso! Sur la venonta Bulteno, ni publikos ĝin, complete, kaj ni certigas ke ĝis impresos forte ĉiujn!

Prezentante la jam diskutitaj aferojn, oni aprobis la translokiĝon de la Federacio al Zaragoza, ĉar Prf^o Sancho Izquierdo kaj En.^o I. Gastón akceptis la koncernajn postenojn.

Rediskutante la alnomigon de venonta kongresurbo, kaj pro malkonsento pri

Ceuta, Reus, Sabadell kaj aliaj urboj, oni decidis ke la Estraro elektu la plej taŭgan.

La dato de la kongreso estis ankaŭ diskutita. Oni proponis Majon kaj Junion, por eviti la trovamecon. Kelkaj defendis Julion kaj Aŭguston pro la libertempa facileco... Fine, oni decidis ke, laŭ la oportuno, la loka komitato de la elektota urbo decidu. D-ro Herrero klarigis ĉiujn aferojn rilantajn Libroservon, kaj la kongresanaro komprenis ke, de nun, la aferoj iros glate, pro la kapablo kaj emo de D-ro Tudela, nia elstara samideano.

La kreskanta sukceso de la Koresponda Kurso de sm.^o Molera estis laŭdita de sm.^o Bosch. Ĉiuj aplaŭdis tiun fervoran samideanon.

D-ro Herrero klarigis la malfacilaĵojn kiuj malpermesas ke Boletín aperu akurate kaj korekte. Oni diskutis tiun punkton, kaj la monatan aperon de «B». Sam.^o Régulo Pérez opinias ke ĝi, prefere, aperu dumonate, sed prifarite.

Pri la nuntempaj gramatikaj disputoj, oni konfirmis la decidon de la preparakunsido, kaj estis aprobita jenan formulon:

«Koncerne la diskutadon Pri «ata-ita», H. E. F. kaj la 22^a H. K. de E. unuanime solidariĝas kun la Rezolucio de U. E. A., aperinta en la maja n.^o de la revuo «Esperanto».

La tuta kongresanaro aprobis la aperon de la propaganda numero de «Boletín», eldonita dank'al la kasa superavito. La petoj jam preskaŭ elĉerpas la eldonon.

Pritraktante la financan staton de la Federacio, kelkaj grupoj promesis plialtigi sian apogon: Bilbao, laŭ promeso de sam.^o Otaola, certigis plialtigon ĝis 1.100 ptjn.

Sm.^o Aragay, esprimante la senton de la tuta kongresanaro, proponis ke oni danku fervore la valladolidajn aŭtoritatulojn, la lokan komitaton kaj la tutan loĝantaron, pro la ĝentila akcepto, apogo kaj bona organizado de la tuta kongresa arango, kaj pro la efika propagando per afiŝoj, gazeta preparado, flagoj, k. t. p. Ĉiuj leviĝis kaj aplaŭdadis kunsente.



Prezidantaro en la Ferma Kunsido, en la «Aŭla Magna» de la Universitato.

Tiel finiĝis la lasta laborkunsido. Ĉiuj rapidis por plenigi la «Aŭla Magna»-n, kie aŭtoritatuloj jam atendis por okazigo de la

FERMA KUNSIDO. — Brila prezidantaro, regata de Moŝta Dekano de la Leĝa Fakultato, S-ro Rubio, pro neeblo de la M^a Rektoro, kaj kun ĉeesto de la Urbestro, kiu ne povis ĉeesti la malfermon.

Inter la elstaraj esperantistoj ĉiuj rimarkis sam^on Taro Niŝiumi, japana profesoro ĉe la Universitato de Okayama, kiu povis ĉeesti, almenaŭ, la lastan kongresan akton.

Sm^o Basilides Sanz resumis la kongresajn laborojn kaj dankis, tre elokvente, la aŭtoritatulojn, kaj sm^o Cantalapiedra legis la rezoluciojn de la kongreso.

Inter la eksterlandaj salutantoj levigis Prf^o Taro Niŝiumi, kiu, per tre eleganta Esperanto klarigis la staton de esperantismo en Japanujo, eksterigis sian profundan emon al nia lando kaj invitis ĉiujn al la venonta kongreso de U. E. A. en Tokio. Li estis entuziasme aplaudita.

Post tradukado de tiu saluto de nia japana elstarulo, D-ro Herrero respondis al li, dirante ke ĉiam, en nia esperanta medio, ni admiras la fortan kaj viglan japanan movadon, kiu espiigas nin al baldaŭa venko de Esperanto.

Sin turnante al la aŭtoritatuloj, li certigis la profundan kaj sinceran dankon de ĉiuj kongresanoj kaj de la Federacia Estraro pro la kora akcepto, brila arango, sindona apogo kaj sincera inklino al Esperanto. Li statigis la esperon pri universitata instruado de nia lingvo, tiel kiel en Valencio, Santiago kaj La Laguna.

Kaj, finante, li asertis ke, pro ĉiuj antaŭdiritaj meritoj, Valladolid rangas inter la plej elstaraj urboj pro sia pruvita inklino al Esperanto.

Moŝta Dekano de la Leĝa Fakultato, Prezidanto de la Kunsido, esprimis la ŝaton de la tuta aŭtoritatularo al tiel merita movado kiel la esperantista, kies penoj por plibonigi la homajn rilatojn estas ekster ĉia dubo.

Poste, li deklaris la Fermon de la XXIII^a Kongreso de Esperanto.

Vespere, en luksa salono de hotelo Filipino la II^a, okazis la kongresa bankedo, kiu, tre inde, markis la finon de la kongreso.

Kun la Komitato kaj la Prezidanto de la Federacio, sidis 140 gesamideanoj, kiuj, tre gaje kaj optimisme komentariis la kongresajn okazintaĵojn. Ĉe la fino, nia granda poeto Fr^o Vilá, aŭtoro de la bela invito al la XXIII^a, honore al Valladolid deklamis, esperantligve, la belan poeziaĵon «Oriental» el la fama valladolida dramverkisto Jozefo Zorrilla. Li estis tre juste aplaŭdita; ankaŭ sm^o A. Bohigas, tiel poeziema, deklamis belan versaron.

Ĉe la fino, D-ro Herrero, emociigita de la momento, adiaŭis, kiel Prezidanto, la kongresanaron. Li diris ke, en Zaragozo, aŭtaŭ ok jarojn, li estis honorigita per la prezidanteco. Tiu epoko estis, por li, la plej konsiderinda en sia vivo, ĉar li havis la grandan honoron reprezenti la hispanan esperantistaron, konsistigata de tiel bonaj kaj simpatiaj kamaradoj, inter kiuj estas multenombraj altvaloraj personoj, kiel Pr^o Sancho Izquierdo, la estonta Prezidanto, kiu, tute certe, majstre kaj profite, kondukos nian ŝipon. «Tial — li diris — mi povas adiaŭi vin kun mia plej profunda sento de dankemo, per tiuj historiaj vortoj: «La Prezidanto mortas, vivu la Prezidanto»!

Kortuŝitaj, ĉiuj aplaŭdis lin kaj multaj ĉirkaŭbrakis lin, plenaj je sincera emocio.

Poste, la atmosfero regajigis, kaj kelkaj simpatiaj valladolidaj samideanoj amuzis ĉiujn per siaj oportunaj aldiraĵoj.

Tiel, finiĝis la XXIII^a! Ĝi markis, sendube, historian momenton en la evoluado de la kastila esperantismo. Ĝi estis semo, kiu, tu certe, ne perdis, Plie, ĝi estis komencigo de sincera ŝato al tiu manpleno de belaj fraŭlinoj kaj simpatiaj kaj viglaj amikoj, kiuj, en Valladolid, kapable kaj fiere, reprezentas nian karan kaj belan idealon.

Sekvantan tagon, aŭtobusa karavano ekskursis al la historiaj kasteloj Simancas, Tordesillas, La Mota kaj Olmedo. Ĉiuj admiris la belajn restaĵojn, trempis en la

kastilia medio, kaj vivis, plian tagon, en mirinda Esperantujo!

Inspiritan saluton de blinda samideano Modesto Rodríguez kortuŝis ĉiujn:

*«Estu benata la horo
kiam ni vizitis cin,
ĉar estis tio por ni
granda plezur' en la koro.*

*Ĉiam en nia memoro
restos, el Valladolid:
plaĉo, bono, amo, rid'.*

*Ĉion ĉi ĉe ni ni trovis,
kaj klare ni vidi povis,
kvankam ni estas... senvid'!»*

LIBROSERVO

Ya saben nuestros lectores que se ha hecho cargo de esta sección nuestro prestigioso amigo y gran esperantista, autor y editor de varios diccionarios, Dr. Ernesto Tudela, el cual nos encarga la publicación de los siguientes párrafos:

Es tan copiosa la edición de libros en Esperanto en todos los países, que por muy abastecidos que lleguemos a estar, no llegaremos nunca a tener ni la tercera parte de todo lo publicado.

Muchos amigos que nos honran con sus pedidos, se impacientan si no los reciben a correo vuelto, sin pensar que muchas veces hay que pedir cada libro al extranjero, a distintas editoriales, cada una en un país, y otras veces a distribuidores que tampoco los tienen en depósito. Rogamos se hagan cargo de que con estos trámites y la obligada lentitud del correo para los impresos, es preciso tener un poco más de paciencia.

Los gastos de correo, etiqueta verde, certificados, etc., suben a veces más que el descuento que nos concede el editor; por lo tanto, los que se adelanten a remitir el dinero, rogamos calculen y remitan algún dinero de más para estos gastos, y a los Grupos que compran en cantidad, que no se adelanten en hacerse descuentos sin previo consentimiento, para evitarnos pérdidas.

Forpasis Profesoro Edmond Privat

Hispana Nacia Radiostacio sciigis plurfoje, la sekvantan tagon, ke Profesoro Edmond Privat, elstara esperantisto, Honora Prezidanto de U. E. A., defendinto de Esperanto en la estinta Societo de Nacioj, intimulo de Dr.^o Zamenhof, kies vivon tiel majstre li priskribis sur famkonata libro, forpasis en Neuchâtel (Svisujo), la 28-n de Aŭgusto.

Neniu konscia esperantisto povas ne ĝuste taksi la gravecon de tiu funebra novaĵo. Nur 73 jaraĝa, Profesoro Edmond Privat ankoraŭ povis esperigi de sia talento, de sia kapablo, de sia prestiĝo kaj de sia entuziasmo.

Ni povas certigi ke ni perdis unu el la tri plej altvaloraj personecoj de nia movado.

Li jam ĉeestis la unuan kongreson en Boulogne, kaj, de tiam, li ne ĉesis laborante por Esperanto, tiel per sia agemo, organizado kaj varbado, kiel per siaj nenombreblaj verkoj, ĉe kiuj oni ne scias kio estas pli valora, ĉu la korekteco, pureco kaj fideleco al la pure Zamenhofa stilo, ĉu la forto de la altiro kaj konvinko. Li estis unu el la plej elokventaj oratoroj en nia movado, ĉar, tre klera kaj scipova, li estis, plie, vera poligloto, ĉar li regis francan, germanan, italan, anglan kaj esperantan lingvojn. Tiun kapablon li altvalorigis per nekomuna oratora forto kaj atentiga voĉo. Lia lasta festparolado, en la kongreso de Bruselo, estis plia pruvo de tiaj elstaraj kvalitoj.

Dum sia tuta vivo li donis al ni ĉiuj daŭran kaj ekzemplodonan lecionon de kio devas esti la vivo de konscia esperantisto. Ni devas alpreni tiun lecionon kaj peni por imiti lin laŭ nia kapablo.

Hispana Esperanto-Federacio bedaŭras lian malaperon, konsciante pri la graveco de la perdo, kaj esprimas sian sinceran kondolencon al Sinjorino Privat kaj al U. E. A.

K A S O

La karaj legantoj de «Boletín» eble memoras la ampleksajn komentariojn aperintaj ĉe la piedo de la statistiko de niaj spezoj dum la jaro 1961.

Nun, mi povas aldoni ke, por la kuranta jaro, niaj enspezoj estos similaj, niaj elspezoj

iom pli grandaj, sed, feliĉ, ni povas antaŭvidi moderan superavilon; ni povas diri, normalan. La PROPAGANDAN numeron de «Boletín», vi jam vidis, kaj la nova eldono de la ADRESARO estas nun en la preseo kaj ni esperas povi sendi ĝin kun le eksterordinara numero de ĉi tiu Kongreso, al ĉiuj membroj; se ne, en la sekvonta.

E. G.

LA TERURA KATASTROFO EN KATALUNIO

Ne nur en Hispanujo, sed en la tuta mondo, la sciigo de la terura katastrofo en Katalunio, fare de subita kaj detrua subakvigo, konsternis ĉiujn. Preskaŭ milo da mortintoj aŭ malaperintoj, centoj da forportitaj loĝejoj, elpreno de maŝinoj kaj ilaroj, ĉesigo de laboro en la plej industria regiono de la lando, estas la bilanco de la kruela bato, ĵus suferita de la bela kaj laborema regiono.

Ĉar ĝi estas, koincide, la regiono kie Esperanto pli dense kaj entuziasme disvolviĝas, en nia lando, dekomence ni multe korpreniĝis pri la sorto de niaj samideanoj, tie loĝantaj, kaj, porinforme, ni tuj petis, de la regantoj de nia afero en la koncernaj urboj, enketon pri eblaj akcidentoj, aŭ, eĉ, forpasoj de karuloj! Post tro longa atendado, fine alvenas la konsolanta sciigo: ĜIS NUN, NEK EN SABADELL NEK EN TARRASA OKAZIS AKCIDENTO NEK MORTO AL IU AJN SAMIDEANO!

Tiu novaĵo trankviligis nin kaj ni, fine, povas aperigi nian Bultenon, kies eldono estis haltigita pro la atendo pri la rezulto de nia enketo. Ke ĝi atingu niajn karajn amikojn kunportante al ili ĉiujn niajn gratulon kaj nian ĝojon pro la bona sorto!

Sed, ni ne forgesu la aliajn, tiujn malfeliĉulojn kiuj, dum teruraj sekundoj estis enflugitaj kaj forportitaj ĝis la maron... Tiujn kiuj savis la vivon sed ne povis eviti la forprenon de la tuta familio kaj de la tuta havaĵo... Tiujn kiuj perdis la frukton de tuta vivo je peno kaj laboro...

La Ŝtato, la Aŭtoritatularo kaj Oficialaj Instancoj, diligente kaj kompreneme, alkuris tuj al la mildigo de la malfeliĉaĵoj. Ne nur el la tuta Hispanujo sed el la tuta mondo, venis ankaŭ helpo kaj promesoj, pruvante ke, en ĉiu homa koro estas io da solidaremo kaj helpemo.

La esperantistaj organizoj en Sabadell kaj Tarrasa, leginte la leteron de la Estraro

de H. E. P., rifuzis ĉian rektan helpon, ĉar, feliĉe, neniu esperantisto estas trafita de la katastrofo. Sed, ni, kiel homaranoj, ne povas resti indiferentaj al tiom da mizero kaj malfeliĉo, kaj la helpo de esperantistoj ne devas manki kaj ni devas kanalogi la bonkorecon kaj ŝprucantan solidarecon de nia samideanaro, starigante, sub la nomo «FONDAĴO KATALUNIO», monan kolektagon, kiun ni sendos, al niaj tieaj samideanoj, por ke ili disdonu ĝin, inter la plej damaĝitaj.

Kelkaj bonvolemaj samideanoj, memvole, pensinte ke ni devis ion organizi tiucelen, jam sendis sian kontribuon.

Ni me povos revivigi eĉ unu el la centoj da mortintoj. Ni me povos redoni vivplezuron al tiuj kiuj perdis familianojn kaj havaĵon. Sed ni, kune kun aliaj bonvolemuloj, povos forviŝi kelkajn larmojn, kaj, ĉefe, ni povos doni, al ni mem, ian ekvilibron al niaj sentoj, per plenumiĝo de nia solidareca devo.

Sabadell kaj Tarrasa estas, delonge, en niaj koroj. Ke Esperanto estu, de nun, por ĉiuj, an Sabadell kaj Tarrasa, ne simpla nomo. ne simpla lingvo, sed, ĉefe, sinonimo de kunpremanta mano, de kunfluanta larmoj, de kunbatanta koro...

La Estraro de H. E. F.


Ĉiu kontribuo al la «FONDAĴO KATALUNIO» devas esti sendita, se eble, ĝis la fino de Novembro, al sam^o Juan Bosch (Pizarro, 18, Valencia). Li, oportune, kvitancos kaj enlistigos la donacojn.

El próximo Congreso de H. E. F.

Por el espontáneo ofrecimiento del Grupo de una importante ciudad, parece ser segura la designación de la misma, que depende tan sólo de las normales gestiones. En el próximo número podremos ser más explícitos.



Moŝta Rektoro kaj ceteraj aŭtoritatoj prezidas la malferman kunsidon.



*La Prezidanto de la L. O. K., S-ro Basílides
Ŝanz García, bonbenigas la kongresanojn.*



*Usona samideano W. Vathis, salutas la
kongresanaron,*



Moŝta Urbestro antaŭ la mikrofono okaze de malkovro de la tabulo ĉe la Esperanto-strato.



S-ro Pelletier salutas la kongresanojn



Sekretario de la O. K., S-ro Mariano Cantalapiedra, legas la rezoluciojn dum la Ferma Kunsido.